

La Progreso

REDACTIE-
COMITE

G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per Jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 881138

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
H. VAN LIER
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

LITERATURA STUDADO

Ne ĉiu esperantisto povas akiri vastan scion pri nia literaturo. Eĉ de B-kandidatoj oni ne postulas vastan scion. Literaturo ja estas fako, por kies ekzakta studado oni bezonas specialan senton. Se tiu premiso mankas, oni povas lerni iujn faktojn, sed ne akiri ian juĝkapablon. Por nia B-diplomo oni tamen postulas literaturan scion. Ĉu tiu postulo estas troa, konsidere la fakton, ke ne ĉiu estas dotita per literatura sento, nek havas la bezonatan talenton por mem okupi sin pri literatura laboro? Ne. Kion oni bezonas scii por tiu ekzameno, tio estas lernebla de ĉiu iom lerta esperantisto. Gravus nur, ke li konu la vojon kiel akiri tiun scion.

Antaŭ pluraj jaroj la studemaj esperantistoj ankoraŭ palpis en mallumo pri la ekzamenaj postuloj en tiu fako, kaj precipe pri la maniero kiel akiri la postulatan scion. La sola konsilanto pri literatura studado (?) tiam estis libreto, prezentanta nur la koncizan enhavon de kelke da verkoj. Ĝia aŭtoro havis same malmultan komprenon pri literaturo kiom la homoj, kiujn li celis instrui.

Tiu periodo forpasis. La ekzamena komitato fiksas klare la postulojn pri tiu fako, kaj jam neniu bezonas pri tio palpi en mallumo. La libreto „Examen doen” klare priskribas tiujn postulojn, aldonante ekzemplajn demandojn. La verketo „Leidraad” montras la vojon kiel studi la literaturon. La broŝuro „De Esperanto-literatuur in vogelvlucht”, kvankam eldonita ĉefe kun propaganda celo, enhavas plenan liston da sciindaĵoj pri literaturaj faktoj, tre utilaj por B-kandidatoj. Kaj jam dum pluraj jaroj „La Progreso” montris en literaturaj ekstraktoj kion kaj kiel oni studu en tiu fako.

Rimarkinda fenomeno estas, ke en la literatura studado en Esperanto gravan rolon ludas la grammatiko, pli gravan ol en alialingvaj literaturoj. Tio rezultas el la karaktero de Esperanto mem, laŭ kiu ĉiu aŭtoro rajtas permesi al si iom deviajn formojn, iom eksperimenti, kio malofte okazas en naciaj lingvoj. Ne estas do mirige, ke en artikolo pri literaturo aŭ en recenzo oni atentigas pri la grammatika flanko pli vaste ol oni kutimas koncerne nacian lingvon. Tiu fenomeno tamen ne malutilas en la studado, eble eĉ utilas al la studanto,

POR KOMENCANTOJ

H. Kujt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 9. Vertaal in Esperanto:

DE INDIRECTE REDE.

Twoe vrienden ontmoetten elkaar op straat. Jan beloofde aan Piet, dat hij hem de volgende dag zou bezoeken. Een dag later, toen Jan bij Piet op visite was, verzocht Jan, of Piet hem een boek wilde lenen. „Met alle plezier,” stemde Piet toe, toen hij zag, met hoeveel bewondering Jan zijn boekenkast bekeek. Even later vroeg Piet, of hij een boek van Zamenhof wilde lezen. „Heel graag,” antwoordde Jan; „Kijk, dit boek, „La Rabistoj”, een vertaling van de Meester, heb ik nog niet gelezen.”

Een ogenblik verliet Jan de kamer. Toen hij terugkwam, constateerde hij, dat zijn vriend het boek reeds aandachtig las. Hij hoorde zelfs niet, dat Piet hem riep.

Vertaling van opgave 7.

Vespere je la oka¹⁾ la kunveno komenciĝis²⁾. Komence³⁾ la kunvenintoj estis tre trankvilaj⁴⁾. Sed post parolado de unu el⁵⁾ la membroj la kunveno maltrankviliĝis⁶⁾. La parolanto⁷⁾ riproĉis al la estraro⁸⁾, ke la kastelo pro nezorgado ruiniĝis⁹⁾. Post ĉi tiu riproĉo kelkaj ĉeestantoj furioziĝis¹⁰⁾. Jen kaj jen¹¹⁾ aŭdiĝis¹²⁾ akraj vortoj, eĉ insultoj. Fine la vilaĝestro ekstaris¹³⁾ kaj komencis trankviligan¹⁴⁾ paroladon. Tuj la disputoj finiĝis¹⁾ kaj ĉiu reprudentiĝis. La vilaĝestro dankis la partoprenintojn en la „lernigaj”¹⁵⁾ debatoj¹⁶⁾ kaj post tio fermis la kunvenon.

1) Ook: *la okan*. 2) Niet: *komencis*; hoewel het nederl. woord „beginnen” evenals eindigen, breken, smelten, draaien” zowel overgankelijk (de onderwijzer begint de les) als onovergankelijk (de les begint) wordt gebruikt, is dit werkwoord in Esperanto slechts overgankelijk (*la instruisto komencas la lecionon*). Moet men dit woord in onoverg. betekenis gebruiken, dan maakt men het onovergankelijk door achtervoeging van „iĝ” (*la leciono komenciĝas*). 3) Ook: *en la komenco*. 4) Niet: zonder „j”; „kunvenintoj” is meervoud, het bijbehorend bijvoeglijk naamwoord komt dus ook in het meervoud te staan. 5) Niet: *de*; is de betekenis „een uit meerdere”, dan wordt het voorzetsel „el” gebruikt. 6) Ook: *fariĝis, iĝis maltrankvila*. 7) Niet: *parolanto*; hij beëindigde reeds zijn rede. 8) Ook: *la estraron*. 9) Niet: *estas ruiniĝanta*; wel: *estis ruiniĝanta*. 10) Ook: *koleregiĝis*. 11) Ook: *de tempo al tempo*. 12) Ook: *estis aŭdeblaj*. 13) Ook: *levis sin, leviĝis*; hoewel de eerste vorm de voorkeur verdient. 14) Ook: *trankviliganta*; hoewel een onnodig lang woord. 15) Ook: *instruaj*; niet: *lernemaj*; d.i. leergierig (*la infanoj estas lernemaj*). 16) Niet: *vortbataloj*; hoewel in werkelijkheid werd geredetwist, sprak de burgemeester over „debatoj” d.w.z. geordende gedachtenwisselingen.

ĉar, se liaj kompreno kaj sento pri literaturo ne sufiĉe evoluis, lia gramatika sento povas kompensi tiun mankon.

Ĝkzistas do diversaj instruiloj pri la literaturo, kaj jam neniu rajtas plendi, ke tiu fako estas al li iom mistera. Kiu scii volas, scii povas. Necesas nur havigi al si la bezonatajn verketojn kaj disponi pri sufiĉe da tempo!

Okaze de la 60jara ekzisto de Esperanto F.L.E. eklonis jubilean verketon, „Esperanto 60jara”, kiu skize pritraktas la lingvan evoluon en nia literaturo. Por akiri plenan komprenon pri la diversaj direktoj, „skoloj”, stiloj kaj la gramatikaj eksperimentoj ankaŭ tiu ĉi verketo povas utili al studemuloj.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Jac. Lem.

Opgave 9.

1. Terwijl ik zat te schrijven, speelde het meisje met haar pop. 2. Met haar vriendinnetje spelende, viel het meisje en brak haar been. 3. Na ons verfrist te hebben, zetten wij onze wandeling voort en bereikten vóór het vallen van de avond ons hotel. 4. Alvorens hij begon te spreken (vertalen met een deelwoord), legde hij zijn aantekeningen op de lessenaar en nam een teug water (vert.: en dronk wat water). 5. Nadat de afgevaardigde van de afdeling Amsterdam had gesproken, nam het bestuur het voorstel over. 6. Stel niet uit tot morgen, hetgeen gij heden doen kunt. 7. Nadat gij uw werk (*tasko*) gedaan hebt (vert. met een deelwoord), moet gij het nog eens overlezen en eventuele fouten verbeteren. 8. Bezoek trouw de conversatie-avonden van uw club; zij zijn leerzamer dan u wellicht vermoedt. 9. Deze zomer kenmerkt zich door buitengewoon mooi weer. 10. Weer moest men de hup van de brandweer inroepen. 11. Ik kan mij niet meer herinneren waar en wanneer ik hem ontmoet heb, noch waarom ik dat gezegd heb, en wat hij mij heeft geantwoord. 12. Tijdens een hevig onweer sloeg de bliksem in de boerderij van N. Het huis brandde geheel af. Tien vârkens en twee paarden kwamen in de vlammen om. 13. Met uitgestrekte armen liep het ventje (*bubo*) zijn vader tegemoet. 12. Een leugenaar wordt door niemand geloofd, en een bedrieger ontzegt men het vertrouwen.

Vertaling van opgave 8.

1. Rapide mi min razis kaj min vestis, ĉar subite mi memoris, ke ni interkonsentis renkonti unu la alian (nin) je la deka. 2. La edzo riproĉis al sia edzino, ke ŝi pro (per) sia konduto estas la kaŭzo de ĉiom da mizero (sufero), kiu trafis ilin (trafinta ilin) (kiu okazis al ili) (okazinta al ili). 3. Li kaŝas sin en ŝranko, por ke li povu subaskulti (por povi subataskulti) la interparolon. 4. Mi miras, ke li venis; mi ne komprenas, ke li ne hontas. 5. Ni memorigis lin pri lia promeso tuj averti nin, se minacas danĝero. 6. Ĉu vi jam abonis „La Progresanto”? Se ne, ne prokrastu, sed faru tion. 7. Se oni havas nenion por fari (nenion fareblan), oni enuas; do gardu vin kontraŭ nenionfarado. 8. Petegante li sin turnis al siaj persekutantoj kaj kriis: „Kompatu min!” 9. Klopodante savi la infanon, ŝi grave vundis sin. 10. Atentu (gardu vin), ne eraru, ĉar unu eraro povas malbonigi la tutan aferon. 11. Rapidu, jam estas malfrue; post kvâronhoro la vagonaro (trajno) forveturos. 12. Ne tiom rapidigu min; tio nervigas min (igas min nerva). 13. Siaj vestoj estis malpuraj kaj eluzitaj (ĉifonaj); tial ŝi sin ĝenis enveni. 14. Per tiu ĉi donaco vi vere (efektive) ĝojigis min. 15. (Re)memorigu lin, ke li ankoraŭ ne pagis sian ŝuldon.

Dem.: Kiel oni povas plej bone klarigi, laŭ Esperanta gramatika vidpunkto, la nezuon de akuzativo en frazoj, kia „Mi trovis tiun rozon velkinta”?

Resp.: En tiaj frazoj la adjektivo (*velkinta*), kvankam koncernanta iun substantivon (*rozon*), tamen en certa senco dependas de la verbo (*trovi*). Tiu dependeco aŭ rilato povas esti trimaniera:

1e. la adjektivo indikas staton aŭ kvaliton dum la ago de la verbo;

2e. la adjektivo indikas staton aŭ kvaliton laŭ la ago de la verbo;

3e. la adjektivo indikas staton aŭ kvaliton rezulte de la ago.

Pro tiu rilato inter verbo kaj adjektivo, la adjektivo ne senpere apartenas al la subjekto aŭ objekto, aliavorte: ne estas atributa; ĝi apartenas al la predikato.

En Esperanto parto de l' predikato neniam povas esti akuzativa.

Adjektivo, apartenanta al la predikato, do estas ciam nominativa. Tiu regulo tre utilas en Esp. por diferencigi la t.n. adjektivajn adverbajn komplementojn (bep. v. gesteldheid), ĉar, se oni uzas akuzativon, la adjektivo estas ne predikata, sed atributa, kaj la senco fariĝas alia.

Dem.: Kiel oni tradukas: Ik werk bij het M.U.L.O.; Ik ben aan een lagere school; L.O.; V.G.L.O.; (M.) U.L.O.?

Resp.: Mi deoras ĉe la Pli Vasta Elementa Instruo; Mi deoras ĉe elementa (unuagrada) lernejo; L.O. (Lager Onderwijs): Elementa, Unuagrada Instruo; V.G.L.O. (Voort Gezet Lager Onderwijs): Daŭriga Elementa Instruo; (M.)U.L.O. (Meer) Uitgebreid Lager Onderwijs: (Pli) Vasta Elementa Instruo. J. v. Scheepen.

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men vóór de 10de van de volgende maand aan het red.-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 13. Vertaal in Esperanto:

Onder natuervolken of primitieve volken worden gewoonlijk de volken met nog weinig ontwikkelde techniek verstaan. Onze belangstelling voor het leven van deze volken — de Afrikaanse negers, de Indianen, Eskimo's, vele volken van Ned. Indië en talrijke stammen van Azië — is in de laatste twee eeuwen sterk gegroeid. En dat niet enkel ter wille van bepaalde belangen, doch ook omdat de zo geheel andere toestanden, die wij bij deze volken vinden, onze verwondering en nieuwsgierigheid opwekken. Door kennis te nemen van die toestanden leren wij na te denken zowel over de voor- als over de nadelen van onze eigen beschaving.

Dr. S.H.

Opgave 14. Vertaal in het Nederlands:

Pri Patriotismo.

Leĝo farita de homoj povas esti neniigata de homoj. La patriotismo, ĉu orienta, ĉu okcidenta estas ĉie sama: veneno, malboniganta la homan pensadon. Ĝi estas malsano kaj kiam vi ekkomprenas kaj konscias, ke malsano ĝi estas, vi vidos, ke via spirito reagos kontraŭ ĝi. Kiam en milita tempo la tuta mondo parolos pri la amo al la patrio, vi rekonos ĝian neverecon kaj kondutos kiel vera homa estaĵo.

Kriŝnamurti („Libera Tribuno“).

Vertaling van opgave 11.

LUCIFER.

Profesoro¹⁾ Van Dijk rakontas en la antaŭparolo de sia libreto pri Socrates la sekvantan anekdoton: Lerneja inspektoro²⁾ vizitis lernejon, kie oni³⁾ pristudis⁴⁾ ankaŭ nacian beletristikon⁵⁾. Al⁶⁾ iu⁷⁾ el⁸⁾ la knaboj li demandis: „Diru al mi⁹⁾, kiu verkis „Lucifer“¹⁰⁾? La knabo ne sciis ĝin¹¹⁾ kaj verŝajne pensis¹²⁾, ke okazis io nedeca per¹³⁾ alumetoj. Li respondis: „Mi ne scias, sinjoro, mi ne faris ĝin“. La inspektoro prenis¹⁴⁾ la duan matenmanĝon¹⁵⁾ ĉe la komunumestro¹⁶⁾ de la loko. Li rakontis pri sia(j) sperto(j) en la lernejo¹⁷⁾ pri la knabo, al kiu li demandis: kiu verkis „Lucifer“, kaj la respondo: mi ne scias, mi ne faris ĝin. „Nu“, diris la komunumestro, „certe kredu¹⁸⁾, ke li faris ĝin!“

Vespere, survoje al la hejmo¹⁹⁾, la inspektoro renkontis en la trajno²⁰⁾ membron de la provinca deputitaro, kiun li konis. Li kompreneble rakontis la okazaĵon pri la knabo kaj la komunumestro. La deputito respondis: „Ho, ĉu vi ne konis ĉi tiun komunumestron? La homo (viro) havas eĉ ne minimuman²¹⁾ komprenon pri muziko.“

1) Ook verkort *prof.* Ook ziet men *p-ro*, wat niet is aan te bevelen, omdat diezelfde verkorting ook wel gebruikt wordt voor *pastro*. 2) *Revizoro* = supera inspektoro. 3) Hiermede vermijdt men de lijdende vorm. 4) Ook: *lernis*. 5) Ook: *patrolandan literaturon*. 6) Ook zonder voorzetsel, dus: *iun*. 7) Ook: *unu*, maar „een“ is hier niet als getal bedoeld. 8) Niet: *de*. 9) „Eens“ wordt niet vertaald. 10) Het lidwoord voor een eigenaam blijft onvertaald. Het verdient aanbeveling te vermelden, dat „Lucifer“ in Esperanto met „alumeto“ wordt vertaald, daar anders de woordspeling niet begrepen wordt. 11) Ook: *tion*. 12) Ook: *opiniis*. 13) „Met“ mag niet vertaald worden met „kun“. Het heeft de betekenis van: door middel van. 14) *Mangis* kan ook; niet *konsumis* = verteren, doch niet consumeren in de betekenis van ons eten of gebruiken. 15) Ook: *lunĉon*. 16) Daar men niet weet, of er sprake is van een dorp of stad, kan men de moeilijkheid ondervangen door „gemeente“ te nemen. 17) Met lidwoord, daar van een bepaalde school sprake is. 18) Een woordelijke vertaling is niet mogelijk. 19) Eveneens met lidwoord. 20) Ook: *vagonaro*. 21) Ook: *etan, malgrandan*.

ŜAKTERMINOJ EN ESPERANTO

Laŭpete de iu leganto ni publikigas kelke da plej gravaj ŝakterminoj. La materion por tiu ĉi publikigo aŭfable disponigis al ni s-ro Torsten Lindberg, redaktoro de la ŝakrubriko en „Heroldo de Esperanto”, kiun ni tre dankas pro lia komplezo.

Nomoj de la ŝakaj pecoj (schaakstukken):

reĝo (koning) (R); *damo* (koningin of dame) (D); *turo* (toren of kasteel) (T); *kuriero* (loper of raadsheer) (K); *ĉevalo* (paard) (C); *peono* (pion) (P);
alo aŭ *flanko* (vleugel) (reĝa kaj dama);
aroko (roquade), *-eto* (korte r.) 0—0, *-ego* (lange r.) 0—0—0;
bloki, *-ado*, *-isto*: ŝtopi, senmovigi pecon per alia peco;
centro (centrum), alizi: la kvar kampetoj ĉirkaŭ la mezpunkto;
defendi, *-o* (verdedigen);
diagonalo (diagonaal, kleine lijn): ekz. al — h8;
du-peono (dubbelpion), *duobla(j)* peono(j): du peonoj samkoloraj sur ekz. e4, e5
eterna ŝakigo (eeuwig schaak);
evoluo (de la pecoj) (ontwikkeling van de stukken);
flanketo: evoluo de K al ekz. g2;
figuro (figuur) (altkvalita: D, T; malaltkvalita: K, C);
gambito (gambiet): ekz. damgambito: 1. d2—d4 d7—d5, 2. c2—c4;
gardi, *-o* (dekken);
intersanĝi -o (afruilen);
kateniĝo: ekz. blanko: Re1, Tf2, nigro: Kg3;
kampeto aŭ *punkto* (veld): ekz. d5;
kvalito (kwaliteit): la valordiferenco inter T kaj K aŭ C;
kolono aŭ *linio* (lijn): ekz. e1—e8;
liberpeono (vrijpion), kiu senbare de alia peono povas promocii je damo;
malfermo (opening): komenca evoluo de la pecoj;
mat-igi, *-o*, *-a* (mat zetten): la reĝo estas ŝaka kaj ne povas forigi la ŝakigon;
movo, *-i* (zet, zetten): ekz. 1. d2—d4;
moudevigo (dwangzet): ofte en finludoj, kiam ekz. la reĝo devas forlasi peonon;
opozicio: ekz. B: Re3. N: Re5 (proksima o.) B: Re2. N: Re8. (malproksima o.);
pado, *-igi* (pat, patzetten): la nure restanta R ne povas movi sin ne fariĝante ŝaka, sed ĝi ne estas ŝaka;
preterpasa preno (en passent slaan) (p.p.): ekz. 1. f2—f4 e4xf3 p.p.;
pozicio (stelling);
promocii, *-o* (dame enz. halen) (je D, T, K aŭ C);
partio (partij): interludo de kontraŭuloj;
remio (remise): nedecida rezultato, 1/2;
rezigno, *-i* (opgeven): cedi pri la gajno;
tabulo (bord) (64—kampeta);
tempero (tempo): gajni, perdi (winnen, verliezen) temperojn;
tempoembaraso (tijdnood): manko de tempo ĉe ŝakhorloĝa kontrolo;
vico: ekz. a8—h8.

Dem.: Kiel vi opinias pri „en ĉio ĉi tio” kiel traduko de „in dit alles”? Mi sentas, ke, ĉar „ĉio” indikas la tuton de la koncernataj aferoj, aldono de „tio” ne konvenas. Ĉu kiel laŭvorta traduko taŭgas „en ĉi tiu ĉio”? Mia opinio „en ĉio” sufiĉas, kaj „en ĉi ĉio” estas tolerebla.

Resp.: Grandparte vi pravas. Sed, ĉar la vorto „ĉio” estas ofte tre relativa, kaj logike do ekzistas „pli da ĉioj”, la esprimo „en ĉi tiu ĉio”, en kiu „ĉi tio” do komplementas „ĉio”, estas neniel erara, tamen neniam uzata. Jam dekomence oni uzis „ĉio ĉi tio”, en kiu formo ambaŭ vortoj: „ĉio” kaj „tio” restas substantivaj. Tiu formo estas iel komparebla kun substantivo havanta apud si apozicion. Dum la lastaj jardekoj oni pli kaj pli anstataŭigas „ĉi tio” per „ĉi”; kaj la nun uzata „ĉi ĉio” ŝajnas al ni preferinda. La partikulo „ĉi” estas uzebla same bone ĉe „ĉio” kiel ĉe „tio”.

Dem.: Ĉu estas korekte uzi akuzativon post „jen”, ekz.: Jen la pilkon!?

Resp.: Preskaŭ neniam oni bezonas fari tion, sed nekorekta tio ne estas. Post „jen” oni egale bone povas subkompreni „vi havas” kiel „estas”. El la unua subkompreno rezultas akuzativo, el la dua nominativo.

ĈU NI KOREKTU LA HISTORION?

KIU ESTAS LA AŬTORO DE IDO?

(Daŭrigo).

Kiamaniere s-ro Berger sukcesis havigi al si novajn dokumentojn, la rakonto ne estas malpli amuza ol edifa.

Antaŭ ol fariĝi occidentalisto, s-ro Berger estis idisto. Dezirante skribi historion de Ido laŭ aŭtentikaj dokumentoj, li petis dum la somero de 1920a al la vidvino de s-ro Couturat, ke ŝi bonvolu permesi al li forporti el Parizo la parton de la korespondado de s-ro Couturat de 1907a ĝis 1913a. Oni scias, ke s-ro Couturat mortis la unuan tagon de la milito 1914a. S-ino Couturat akceptis lin plej ĝentile en Parizo, kaj en la studoĉambro mem de s-ro Couturat li faris kolekton da leteroj plej interesaj. Ĉiuj leteroj estis klasifikitaj laŭ la nomo de la korespondantoj. Ĉio estis en ordo. Unu sola pako mankis, la pako de s-ro de Beaufront. Tia manko kompreneble surprizis kaj precipe elrevigis la historiiston, ĉar en tiu pako troviĝis la dokumentoj pri la afero de 1907a. Demandite pri tiu strangajo, s-ino Couturat klarigis, ke antaŭ tri semajnoj s-ro de Beaufront, informita pri la intenco de s-ro Berger, venis Parizon, kaj forportis leterojn, kaj precipe la siajn proprajn.

„En ĉi tiu epoko“, diras s-ro Berger, „mi estis konata kiel bona idisto; mi havis bonegajn rilatojn kun s-ro de Beaufront; tial mi estis mirigita pri tiu antaŭzorga aŭ antaŭforiga agmaniero.“

Sance, s-ro de Beaufront forgesis esplori kelkajn pakojn; kaj restis sufiĉe da dokumentoj sufiĉe kompromitaj.

S-ro Berger revenis Svisujon kun valizo plenŝtopita de grandvaloraj paperoj! Kiel, kial s-ro de Beaufront perfidis? S-ro Berger faras hipotezon, kiu ŝajnas al mi tre versimila. De kelkaj jaroj, li diras, s-ro de Beaufront estis iom en ombro, malantaŭ novaj ĉefoj, fervoraj kaj talentoplenaj. *Inde irae...* Mi, parolante pri mi, neniam forgesos iun kunvenon en „Sorbonne“, okaze de disdono de premioj al esperantistaj laŭreatoj, kiun prezidis s-ro Carlo Bourlet. Tiu ĉi akceptis s-ron de Beaufront kun malvarma ĝentileco, kaj post rapidaj salutoj kaj banalaj paroloj, ne plu zorgante pri li, lin lasis sola, sen speciala konsidero, en angulo de la akceptejo. Ŝajnas al mi, ke galo koloris la vizaĝon de s-ro de Beaufront, ke brilis en liaj okuloj koleraj fulmoj kaj certa volo de venĝo. Mi tiam konvinkigis, ke iam, per tiu aŭ alia maniero, la tre ofendiĝema markizo sin venĝos. Ĉu mi estis prava?

Ĉu li esperis, ke li retrovos honorojn, popolfavoron iom dividitajn; ĉu li antaŭkalkulis sukceson de la Delegacio, de la reformoj de li proponitaj, defenditaj? Oni tiam pli aŭ malpli malkaŝe parolis en la grupoj pri reformoj. S-ro de Beaufront povis ekscii, ke komandanto Lemaire kaj d-ro Javal proponis 250.000 francajn frankojn al d-ro Zamenhof sub preteksto lin liberigi de la tirana protekto de la firmoj, se li konsentos aprobi reformojn. Kiam d-ro Zamenhof rifuzis, d-ro Javal ekkriis: „Couturat estas nia granda estro!“

Komandanto Lemaire resendis al s-ro Couturat la detalojn de la projekto kune prilaborita, la 2an de majo 1907a, kun tiuj linioj, kiujn s-ro Berger pro ilia graveco reproduktas en la franca teksto: „Je me mets à votre disposition comme homme de paille. Je vous fais cette proposition en tout bien, tout honneur et, dois-je le dire, avec le seul désir de vous aider éventuellement mieux que par mon seul appui.“ Mi tradukas: „Mi metas min je via dispono, kiel ŝajna respondanto (pseŭdoaŭtoro). Mi faras al vi tiun proponon tute bonintence, kaj, ĉu bezono estas tion diri, kun sola deziro vin helpi okaze pli bone ol per simpla apogo.“

Ni ne havas la respondecon de s-ro Couturat. Kial li ne akceptis la proponon de komandanto Lemaire? Ĉu s-ro de Beaufront faris al li la saman proponon? Ĉu s-ro Couturat propramove proponis al li la rolon de ŝajna respondanto? Ĉiukaze, diras s-ro Berger, ĉiuj principoj de Ido estis kunigitaj iom post iom de s-ro Couturat post diskuto kun siaj amikoj; tio evidentigas per la detala ekzameno de la korespondado de s-ro Couturat, en kiu, bonvolu rimarki, neniam estis menciata la nomo de s-ro de Beaufront, escepte en kelkaj leteroj al s-ro Michaux. Rimarku ankaŭ, ke, dum s-ro Couturat ĉiam parolas pri la samaj reformoj, plurale i, forigo de literoj kun ĉapeloj, de la akordo de l' adjektivo, de la deviga akuzativo k.t.p., s-ro de Beaufront kontentiĝis per proponoj pri pronomoj kaj demonstrativaj adjektivoj.

(Finota).

TRA NIA LITERATURO

VIVO DE ZOLA.

de Aŭgusteno de Silva, el la portugala tradukis Manuel de Freitas.

Biografio pri la konata verkisto Emile Zola. En streĉe interesa maniero la aŭtoro rakontas speciale pri la kreiĝoj de ĉiu verko de Zola, kaj la intensa, sed senracia kontraŭagado, kiun la granda verkisto spertadis, malkaŝante en siaj verkoj la putrajn lokojn de nia socio. Malgraŭ tiu insidado kontraŭ li, Zola akiris certan famon kaj eksterordinaran popularecon.

Eble iom strange impresas, ke biografio pri tiu ĉi franca verkisto aperas ne de franca aŭtoro, sed de portugala. Sed kion franco ne entreprenis, tion prave povas fari alinaciano.

Rimarkinda estas la bona kaj flua stilo en tiu ĉi libro. Nur kelkloke ĝi sentiĝas kiel traduko; ĝenerale ĝi fluas kvazaŭ originalo kaj estas sufiĉe internacia, montrante lertan esprimkapablon de l' tradukinto.

Metaforoj ne estas multaj, tamen atentindaj: *stonego mordita de la tempo* (11-3); *kiuj sentis pulsi en sia sino la spiriton de l' raso* (33-32); *gluiĝis al la plandumoj la sama imperia koto* (42-12); *tiuj, kiuj jam akiris bonstaton kaj konjugis la verbon konservi* (47-34); *liaj libroj kriegas tra la mondo* (61-1); *pontifikumi en kafejoj* (63-1); *pluvis la protestoj* (77-32).

Bonaj tradukoj estas: *uzpoluritaj pantalongenuaĵoj* (31-1); *iliaj ulaj moŝtoj* (49-13); *aliaj kun malŝato falellasis siajn kronikojn* (53-3).

Sub la flua stilo tamen kaŝiĝas diversloke gravaj pekoj kontraŭ iuj gramatikaj reguloj, precipe koncerne la akuzativon, la reflektivajn pronomojn kaj la verboformojn.

El la unuaj ni menciu: *se li tion ne sukcesis* (26-11); *li neniam forestis la laboron* (30-11); *mankis tion pruvi* (38-27); *kion li prezentis... kiel kruda(n) skizo(n)* (60-13).

El la duaj: *por ke Zola... aĉetu traklasajn biletojn por li (si) kaj lia (sia) avo* (16-29); *se li ne povos fariĝi profesoro, ... kun vivrimedoj garantiitaj de sia (lia) kursdiplomo* (19-23); *siaj artikoloj aperos* (31-24).

El la triaj: *por ke estus* (59-36); *por ke batalado ne ekestiĝus* (67-7); *kutimita* (86-3).

Krome ni notis la jenajn atentindajn formojn: la finaĵon *atulo*, supozeble laŭ-principe uzitan (*konatulo*, *trafitulo*, *subprematulo*); *laŭa* anst. *konforma* (*laŭa al kontentigo*, *konstruado laŭa al homkapabloj*); infinitivon post *daŭri*, kion Zamenhof malaprobis, sed kio tamen estas defendebla; neĝustan pluralon (*statutoj*); la kontraŭ-fundamentan *altula*; la iusence uzindajn *pleje*, *fore*, *eĉ foren* (*liaj okuloj rigardis pli foren* 55-5); la nebelajn *sen ke* kaj *sen esti viventa*, erare skribitajn vortojn *departe(a)mento*, *e(a)mbasadoro*. Flanke de *vivu'i*, ĝenerale skribita *vivui*, ni trovis la same bonan *mortu-adi*. Malsukcesinta estas la esprimo *bedaŭrante ne esti sin lasinta arestiĝi* (96-4). Malaprobindaj estas *senkompato* (*sen ec*), *senintereso*, *senkonscio*, sed bona: *senkurageco* (56-1). Malofta, sed bona estas la vorto *rea* en *submeti sin al rea juĝo* (48-28). Gena la vorto *Kajzero* (84-25).

Malgraŭ la kritikindaĵoj, kiuj feliĉe alternas kun multaj trafe elektitaj formoj, ni povas aplaŭdi la aperon de tiu ĉi traduko, ankaŭ pro tio, ke la tradukinto sin montris lerta kaj facilpensa interpretanto, kiu ne lasis sin embarasi de nacilingvaj esprimoj. La kelkaj idiotismoj, kiujn ni trovis, estas bone uzeblaj en Esperanto. En proksima estonteco Freitas sendube havigos al ni pli da bonvenaj tradukoj.

INSTRUA SERVO

En Oktobro komenciĝos la novaj *Skribaj Kursoj*.

Ĉiu propagandu la *elementan kurson* inter amikoj kaj parencoj. Studemuloj! partoprenu A- aŭ B-kurson. Plej studenda materialo. Kapablaj korektantoj.

Estontaj funkciuloj atentul Komenciĝos ankaŭ *funkciula kurso* sub gvidado de k.do J. W. Prent. Nepre utiligu la okazon lerni organizi.

Petu detalajn informojn pri ĉiu el la kursoj la la sekretario H. Kuijt, Ruijchstraat 131, Amsterdam-Oost.

HISTORIO

L.E.A.-KOMITATO EN S.A.T.

La plimulto el la nun ekzistantaj Laboristaj Esperanto-Asocioj (L.E.A.-oj) estas ligita al S.A.T. pere de la Gotenburga Konvencio. Tiu ĉi konvencio difinas la taskojn de S.A.T. kaj L.E.A.-oj krei ordon en la diversaj laboroj kaj gardi kontraŭ konfuziĝo, el kiu povus rezulti konfliktoj.

Laŭ la G.K. S.A.T. okupas sin pri la uzado kaj praktikado de Esperanto, la tiel nomita PER-laboro, kaj la L.E.A. prizorgas la propagandon, la POR-laboron. Krome, pere de la G.K. S.A.T. kaj la L.E.A. promesas, ke L.E.A. instigu siajn membrojn partopreni en la laboroj de la koncernata L.E.A.

Ĉi tiu arango sufiĉe bone distingas la ambaŭflankan agadon, sed troviĝis en ĝi unu hiato: ĉiu L.E.A. prizorgas la propagandon sur sia nacia tereno, sed mankas instanco rajtigita prizorgi la POR-laboron sur internacia tereno. Krom tio la diversaj L.E.A.-oj posedis nenian rektan kontakton, kiu povas esti tre utila por la reciproka propagando kaj por la informado.

Por forigi tiun mankon oni fondis la L.E.A.-Komitaton en S.A.T. En la S.A.T.-kongreso en Brussel (1938a) tiurilata propono estis akceptata, sed, ĉefe pro la interveno de la dua mondmilito, la komitato ne eniris praktikan vivon. Nur en la lasta S.A.T.-kongreso en Aarhus (1947a) ĝi estis definitive starigata, kaj difinita Interkonsento aprokata de la partoprenantoj.

La du unuaj paragrafoj sufiĉe klare prezentas la taskon de la L.E.A.-Komitato en S.A.T. Tiuj ĉi paragrafoj tekstas:

1. Celo.

Inter la L.E.A.-oj, subskribintaj la Gotenburgan Konvencion, estas kreita en la kadro de S.A.T., L.E.A.-Komitato, kies celo estas la propaganda laboro sur internacia tereno, kaj interhelpo de L.E.A.-oj.

2. Konsisto.

L.E.A.-Komitato konsistas el po du reprezentantoj, elektitaj de P.K. de S.A.T., kaj du de ĉiu L.E.A.

La komitato rajtas elekti unu reprezentanton de lando, en kiu ne ekzistas L.E.A. akceptinta la Gotenburgan Konvencion, sed tiu membro devas esti akceptebla al ĉiu membro de la komitato, kaj havas konsilan voĉon.

Krom S.A.T. aliĝis jam al la komitato la jenaj L.E.A.-oj: angla, dana, franca, itala, nederlanda kaj sveda.

Ĉar Belgio apartenas parte (Flandrio) al la nederlanda, kaj parte (Valonio) al la franca L.E.A., ĝi estos reprezentata de flandra kaj valona komitatanoj, elektitaj en interkonsento kun la nederlanda kaj franca L.E.A.-oj.

W.F.K.

Dem.: Pri propraj nomoj mi opinias:

- ke majusklon postulas „Rejno, Alpoj, Apenina Duoninsulo“;
- ke nomoj de monatoj kaj tagoj postulas majusklon; se ne, oni devus skribi „la februaro estas bela monato“;
- oni povus diri „morgaŭ“ estos vendredo“, ĉar temas pri iu vendredo; tiukaze oni devus diri: „la proksiman jaŭdon, la dimanĉo estas libera tago“;
- oni skribu: „1947“ anst. „1947a“, ĉar ĝi estas propra nomo;
- oni skribu: „la bela Parizo, la altaj Alpoj, la malvarma Januaro“.

Resp.: Via teorio estas tute malĝusta. Principe vi opinias, ke propraj nomoj ne postulas artikolon, sed tiun regulon vi rompas per e. Kontraŭe el via rezono ni konkludas, ke laŭ via opinio speconomio postulas artikolon. Tio estas nepre erara. En a. vi pravus, sed:

- En via frazo „Februaro“ estas propra nomo, do kun majusklo. Sed eĉ, se ĝi ne estas propra nomo, kial ni uzu artikolon? Ĉu ni ne povas skribi „tablo estas bona meblo“, sed devus skribi: „la tablo“?
- Se temas pri speciala tago, oni uzu „la“, se ne, do sen artikolo, kaj en la dua kazo oni subkomprenu „iu“.
- Vi eraras. „1947a“ ne estas propra nomo, sed mallongigo de „la 1947a jaro“. Ĝetere, praktike oni uzas ofte la jarnombrojn sen aldonita a.
- Tio estas nacilingva kutimo. Ni ne vidas neceson uzi artikolon, se propra nomo havas adjektivon, sed skribas korekte: „bona Johano, bela Paris, malvarma Januaro, Apenina Duoninsulo (aŭ: Preskaŭinsulo).“